

Naŭa instru-eksperimento de esperanto en baza lernejo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 485, 1981.06.04 & 06

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por la naŭa fojo mi eksperimente instruas esperanton en la lernejo. Tiu ĉi instruado, kiu estas nedeviga, grupigas interesatojn el kvin klasoj en baza lernejo de la urbo La Chaux-de-Fonds. Ĝi komenciĝis antaŭ ses monatoj komence de la monato decembro en 1980 per grupigo de ĉiuj klasoj de la 4-a lerneja jaro. A1 tiuj infanoj 9-jaraj mi klarigis, kio estas esperanto, kaj pergeste mi ekinstruis kelkajn kompreneblajn frazojn, kiujn tiu cento da geknaboj move efektivigis ripetante la proponitajn vortojn: mi sidiĝas, mi stariĝas, mi kuras, mi saltas, mi krias, mi silentas. Sekvis ordonoj, al kiuj tiuj cent infanoj provis obei: sidiĝu, krii, silentu, stariĝu, saltu, kuru, kuŝiĝu, dormu!

A.- Aldoniĝis klarigoj pri la kurso mem, al kiuj estis kunvokitaj ĉiuj interesataj gelernantoj, kondiĉe ke la gepatroj estu konsentaj. Ĉiu infano ricevis informilon donotan al la gepatroj. Tiu flugfolio invitis la gepatrojn al klariga vespero pri esperanto mem kaj pri la instru-eksperimento okazonta.

C1.- La postan merkredon trideko da geknaboj ekvizitis la unuan lecionon de la proponita kurso. Ĝi okazis matene je la momento de la eliro el la lernejo. Anstataŭ tuj forkuri hejmen por tagmanĝi, la interesataj gelernantoj grupiĝis en la gimnastikejo por dudekminuta instruado de esperanto. La ejo mem favoras la pergestan instruadon.

A.- Dua dudekminuta lekcio estis proponita, kaj la gelernantoj povas elekti inter du tagoj: ĉu la mardon, ĉu la vendredon. Tiujn tagojn, ankaŭ je la 11-a horo kaj duono, la interesatoj, anstataŭ foriri hejmen, renkontiĝas en mia klasejo por ĉeesti perbildan instruadon de esperanto.

Cl.- Same kiel por la aliaj eksperimentoj, mi ne kontrolas la regulecon de la partopreno al la kurso, por ke ĝi restu absolute libervola. Mi antaŭsciis, ke post efemera intereso duono de la infanoj iom post iom rezignos al tiu ĉi lernado, sed ke la aliaj tre regule venos.

A.- En ĉiu eksperimento mia edzo celas metodikan memtrejniĝon. Li iras al la malkovro de instruebloj ĝis nun neglektitaj. En 1979 li publikigis en la franca, raporton pri la oka eksperimento, kies novaĵo estis la pergesta instruado. En la nuna naŭa eksperimento li provas meti la akcenton je la perbildaj instru-rimedo.

Cl.- La perbildaj instru-ekzercoj favoras la organizon de lingvaj ludoj, kiuj avantaĝe anstataŭas la aŭd-vidan instruadon, kiu estas malpli fleksebla, ĉar precize antaŭprogramita.

A.- Tiuj ĉi ludoj per bildoj donas al la infanoj multajn okazojn ne nur manipuli, sed eĉ moviĝi. Kaj tio akcelas la asimiladon de la akirota vortaro.

Cl.- Oni nun scias, ke memorigo, kiu baziĝas sur ekzercoj korp-movaj, estas pli efika, ol tiu, kiu reduktiĝas al nura cerba procezo.

A.- Estas konate, ke teksto laŭtvoĉe parkerata estas pli rapide kaj pli sekure asimilita, ol se ĝi estas nur perokule legata. En la laŭt-voĉa legado la memorprocezo ligiĝas al la movoj de la lipoj, de la lango kaj de la parolkordoj. Kiam la infanoj samtempe efektivigas kaj rakontas

proponatajn agojn, ili kapablas asimili en kelkaj minutoj multe pli da frazoj, ol nuraj legekercoj ebligas. La memorprocezo ligiĝas al movoj de multaj muskoloj.

Cl.- Per bone programitaj ekzercoj gestaj kaj perbildaj, oni povas asimiligi tre rapide grandan vort-provizon, kiu fariĝas la fundamento de posta instruado, kiu povas efike efektiviĝi nur en esperanto.

A.- La ĉefa metodika kondiĉo al tiu ĉi instruado estas la absoluta elimino de la pertraduka instruado, kiu restas ege intelekta, dum la pergesta profunde invadas la psikon de la instruato.

Cl.- Ekde la unua enkonduka minuto la utiligo de alia lingvo, ol la instruata, estas simpla tempoperdo. Se ekzemple instruisto deziras, ke la gelernantoj prenu seĝon por formi rondon, li mem agu, dirante Ĉion, kion li faras. "Mi prenas seĝon". Kaj li instigu la instruatojn imiti lin: "Ankaŭ prenu seĝon!" Mi portas la seĝon. Portu vian seĝon ! Mi metas mian seĝon tien. Metu vian seĝon tien. Formu rondon. Jes, bone! Mi sidiĝas. Sidiĝu !" Ktp...

A.- En la komenco oni bezonas multe da tempo por akiri la deziratan rezulton, sed tiu ĉi tempo ne estas perdita. Lingvaj refleksoj akiriĝas. Kaj tre rapide ŝajnus nenormale, ke en leciono de esperanto oni nacilingve parolu. Instruanto kiu, por ŝpari tempon, krokodile ordonas formi rondon per la seĝoj, fakte malhelpas la akiron de lingvaj refleksoj. Kaj poste li ne povos plu instigi la lernantojn ne krokodili.

Cl.- Tiu sinteno, kiu ekde la unua momento de la esperanto-instruado, eliminis ĉian revenon al la krokodila lingvo, kondukas al multe da dinamismo kaj da bonhumoro kaj ege favoras la rapidan akiron de la lernata lingvo. Sed kiam tradukado fariĝas tabua, oni devas trovi taŭgajn anstataŭajn rimedojn: tiam gestoj kaj bildoj sin aŭtomate trudas.

A.- Nur kiam la pergestaj kaj perbildaj ekzercoj estos alportintaj la necesan fundamentan vortprovizon, oni povos nuancigi la instruadon per leg-ekzercoj, en kiuj oni asimiligas la novajn vortojn, neniam per tradukaj rimedoj, sed nur pere de klarigoj kaj ekzemploj en esperanto mem. Denove oni eble havos la impreson, ke la traduka rimedo ŝparus tempon. Tiu impresio estas simple trompa.

C1.- En la naŭa eksperimento, pri kiu ni komencis hodiaŭ raporti, la momento eklegi alvenis post tri monatoj. Tiam la disdono de la unua lego-libro "Esperanto por Infanoj" de Solomon, premiis la ĉeestantojn. Kaj la legado restas duaranga afero pli konkluda ol enkonduka en la instru-metodiko. La perbilda instruado preparas la infanojn al la kompreno de la tekstoj, kiujn ili trovas en la legolibro. La venontajn semajnojn ni detale klarigos, kiel per bone elektitaj bildoj manipuleblaj, kiujn la infanoj povas kuŝigi sur la plankon aŭ sur tablon, aŭ fiksi al flanel-tabulo, ili lernas ne nur nomojn de bestoj, de homoj, de objektoj, sed formas pli kaj pli longajn frazojn, laŭ bone programitaj modelaj ekzemploj.

A.- Kaj ni konstato, ke tiuj ekzercoj, kiuj estis imagitaj por la instruado al infanoj, ankaŭ konvenas por la plenkreskuloj.

C1.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond komencis raporti pri nova instru-eksperimento de esperanto en lernejo elementa de la urbo La Chaux-de-Fonds. Ĝis reaŭdo !